personoj. Estis ses prezindaj laboroj, kiujn prijuĝis la redaktoro de EP, s-ro Berger, kaj mi. Mi deklaras kiel sekciestro de la stenografoj en GEA, ke la afero estas tute en ordo. La gajnintoj skribis en rapideco de po 140 silaboj en minuto (1), 150 (1), 80 (1), 60 (3).

La eldonejo de EP kretebuis per donaca disponigo de tri premioj por la gajnintoj.

Hermann Korell, Velbert

Tri simplaj anekdotoj

La ruzaj hundoj

Cina diplomato rakontis iam en la rondo de siaj amikoj jenan amuzan historieton:

Dum sia restado en Cinujo li havis kvar hundojn. Kiam li revenis hejmen juvespere post la deĵoro, li trovis la hundojn dormantaj sur lia lito. Kolere pro tiu malbona konduto, li forpelis ilin kaj batis ilin per bastono. Kiam li venis hejmen la postan vesperon, la hundoj kuŝis sur la planko, do ne sur lia lito. Sed kiam li metis sian manon en la liton, li trovis ĝin ankoraŭ tute varma de iliaj korpoj. Kaj li batis la hundojn refoje. En la tria

vespero li revenis eĉ pli frue ol kutime, ĉar li volis funde esplori la aferon. Jen la hundoj sidis antaŭ lia lito kaj blovis sur ĝin, por ĝin malvarmigi.

Bona-parto

Oni scias, ke Napoleono estis korsikano, do italo laŭnasko. En la itala lingvo, kiel ankaŭ en la germana, oni diras ofte anstataŭ „granda parto“: bona parto.

Iam dum sia itala militiro Napoleono diris al italino:

„La italoj ja ĉiuj estas friponoj!“
„Ne ĉiuj“, ŝi respondis trankvile.
„sed bona-parto.“

La osteto en la gorgo

En banloko de Svislando riĉa komercisto sidis ĉe la gastotablo kaj havis la malbonŝancon gluti osteton, kiu restis en lia gorgo.

Li kredis, ke li devos sufokiĝi, kaj jam li fariĝis tute blua en la vizaĝo. Hazarde, kuracisto estis tute proksime. Tiu alkuris kaj eliris la osteton per siaj instrumentoj. La postan tagon la komercisto venas en la hotelon al la kuracisto kaj diras: „Hieraŭ vi havis la afablecon fari al mi servon. Vi permesos al mi, iom pagi por tio. Bonvolu diri al mi, kiom vi postulas por la malgranda operacio.“ „Sinjoro“, diras la kuracisto, „pagu al mi la duonon de la sumo, kiun vi estus doninta, kiam la osteto ankoraŭ troviĝis en via gorgo.“

Josef von Eichendorff

El la vivo de Netanigulo

ROMANTIKA NOVELO · TRADUKO EL LA GERMANA LINGVO DE PAUL BENNEMANN

(Unua daŭrigo)

Mi ekstaris volante foriri; jen ekvidis min la malpli juna de la belaj sinjorinoj. „Ej, tute kvazaŭ alvokita!“ ŝi kriis al mi kun buŝo ridanta: „Li veturigu nin trans la lageton al la alia bordo!“

Singarde kaj timeme la sinjorinoj unu post la alia nun eniris en la boaton, la sinjoroj helpis ilin kaj iomete fanfaronis pri sia kuraĝo sur la akvo.

Kiam la sinjorinoj ĉiuj estis kuŝiĝintaj sur la flankaj benkoj, mi debordigis. Unu el la junaj sinjoroj, kiu staris tute antaŭe, komencis nerimarkeble balanci. Jen la sinjorinoj timeme sin turnis tien kaj reen, kelkaj eĉ kriis. La bela sinjorino, tenanta lilion en la mano, sidis proksimege ĉe la bordo de l' ŝipeto kaj kviete ridetante rigardis malsupren al la klaraj ondoj, kiujn ŝi tuŝetis per la lilio, tiel ke en la akvo inter la respeguliĝantaj nuboj kaj arboj estis duan fojon videbla ŝia tuta figuro kvazaŭ anĝelo, kiu mallaŭte ŝvebas tra la profunda blua fono de l' ĉielo.

Dum ke mi ankoraŭ tiel rigardadas al ŝi, subite la gaja dikulino, la alia de miaj du sinjorinoj, deziras, ke dum la veturado mi ion ajn kantu. Rapide tre danda juna sinjoro, kiu sidas apud ŝi, kun okulvitroj sur la nazo, sin turnas al ŝi kaj kisas dolĉe ŝian manon dirante: „Mi dankas vin pro la ingenia ideo! Popola kanto, de la popolo kantata en libera kamparo kaj arbaro, ĝi estas alp-rozeto sur la alpo mem. La „kornoj de mirakloj“ estas nuraj herbarioj, ĝi estas la animo de la nacia animo.“

Sed mi diris, ke mi scias por kanti nenion sufiĉe belan por tiaj gesinjoroj. Jen diris la ineitnokema ĉambristino, kiu kun korbo plena de tasoj kaj boteloj staris dense apud mi kaj kiun ĝis nun mi tute ne estis rimarkinta: „Li scias ja preskaŭ beletan kanton pri multbela sinjorino“.

„Jes, jes, tiun Li kantu senĝene“, tuj rekriis la sinjorino.

Mi ruĝiĝis trans la tuta vizaĝo. En tiu momento ankaŭ la bela sinjorino subite levis la okulojn de la akvo kaj ĵetis al mi rigardon penetrantan miajn korpon kaj animon. Tiam mi ne pripensis longe, prenis kuraĝon kaj kantis tute libere el plena brusto kaj kantoĝojo:

Mi kie ajn restadas
en frumatena hor',
sur montoj, en ravino —
vin, bela nobelino,
salutas mia kor'.

Sur miaj bedoj kreskas
da floroj kelka stri'.
Abundon mi kolektas
kaj belajn kronojn plektas —
salutojn nur por ŝi.

Sed iun doni ne riskas
mi, malaltranga vir'.
Do ili velkos iam:
sed en la kor' neniam
forvelkos la sopir'.

Mi ŝajne ja serenas,
laboras plu sen fin':
sed koro volas krevi:
kaj mi ne ĉesas revii,
ĝis tombo glutos min.

Ni alteriĝis; ĉiuj gesinjoroj eliris: multaj el la junaj sinjoroj — mi klare estis rimarkinta tion — estis dum mia kantado mokintaj min antaŭ la sinjorinoj, per ruzaj mienoj kaj frustrado. La sinjoro kun la okulvitroj kaptis forirante mian manon kaj diris — mi jam ne scias kion. La malpli juna de miaj sinjorinoj rigardis min tre afable. La bela sinjorino estis mallevinta la okulojn dum mia tuta kanto, kaj nun ŝi ankaŭ iris for kaj diris tute nenion.

Sed en miaj okuloj kuŝis larmoj jam dum ke mi kantis ankoraŭ; mia koro estis preskaŭ krevonta sekve de la kanto, krevonta pro honto kaj doloro. Nun subite mi ekkonsciis tute klare, kiom bela ja estas ŝi, kaj kiom mi estas malriĉa kaj mokita kaj forlasita de la tuta mondo —. Kaj kiam ĉiuj estis malaperintaj malantaŭ la arbetoj, tiam mi ne povis pli longe retenii min; mi ĵetiĝis sur la herbon kaj ploris maldolĉe.

Dua Kapitro

Proksimege ĉe la sinjora ĝardeno la ŝoseo preteriris, disigita de ĝi nur per alta muro. Vere beleta imposto-dometo kun ruĝa tegoltegmento estis tie konstruita kaj post ĝi malgranda, multkolora ĉirkaŭbarita florgardeneto, kiu per murfendo de l' kastelĝardeno tuŝis ties plej ombran kaj plej kaŝitan parton. Tie la impostkasisto ĵus estis mortinta, kiu antaŭe loĝis en ĉio ĉi.

Jen iun frumatemon, kiam mi kuŝis ankoraŭ en plej profunda dormo, la skribisto el la kastelo venis al mi kaj urĝe vokis min al sinjoro la administristo. Rapide mi vestis min kaj promenitis malantaŭ la gaja skribisto, kiu dumvoje jen tie, jen tie deŝiris floron kaj metis ĝin antaŭe sur la jaketon, jen arte skermis en la aero per sia promenbastoneto kaj parolis al mi en la venton ĉion ajn, el kio mi tamen nenion komprenis; ĉar miaj okuloj kaj oreloj estis ankoraŭ plenaj de dormo.

Kiam mi eniris la skribejon, kie ankoraŭ ne estis vera tago, la administristo sidis malantaŭ grandega inkujo kaj amasoj da papero kaj libroj, rigardis al mi el sub respektiga peruko, kiel la strigo el sia

REVO-VERO

Antaŭhierau vidis mi
knabinon sur la strato.
Al mi hazarde ridis ŝi...
ĉu signo de la fato?

Mi pensis: „Cu ekŝatas min
knabin' — pro rido ŝia?“
Ĝi estis kvazaŭ bona vin' —
mi sentis min ebria.

Ho! — eble nun atendas vi
poemon pri la amo;
ĝin vere ja eksentis mi
kun tre ardega flamo.

Sed aŭdu nun: Subite ŝi
min vekis per la frazo:
„Makulo estas tie ĉi
sur pint' de via nazo...“

B. S.

nesto, kaj ekparolis: „Kiel Li nomiĝas? De kie Li venas? Ĉu Li scias skribi, legi kaj kalkuli?“

Kiam mi estis jesinta tion, li pludiris: „Nu, konsiderante Lian bonan konduton kaj specialajn meritojn, ŝia moŝto destinis por Li la vakantan oficon de l' impostkasisto.“

Mi rapide traesploris en mi mem miajn ĝisnunanajn konduton kaj bonmoraĵojn; kaj mi devas konfesi, ke fine mi mem opiniis, ke la administristo estas prava. — Kaj jen mi estis efektive impostisto, antaŭ ol esti pensinta tion.

Mi nun enloĝiĝis tuj en mia nova ejo kaj post mallonge sentis min enhejma. Mi trovis kelkajn uzilojn, kiujn la mortinta kasisto lasis al sia posteulo, inter ili belegan ruĝan noktsurtuton kun flavaj punktoj, verdajn pantoflojn, dormĉapon kaj kelkajn pipojn kun longaj tuboj. Cion ĉi mi jam estis iam dezirinta, kiam mi ankoraŭ estis hejme, kie mi ĉiam vidis nian pastron iranta tiel senĝene.

La tutan tagon (okupon mi ja ne havis) mi sidis tial sur la benketo antaŭ mia domo kun noktsurtuto kaj dormĉapo; mi fumis tabakon el la plej longa tubo, kiun mi estis trovinta inter tiuj de la mortinta kasisto, observis, kiel sur la ŝoseo la homoj iris, veturis kaj rajdis tien kaj returne. Mia sola ĉiama deziro estis, ke ankaŭ el mia vilaĝo kelkaj homoj — kiuj ĉiam estis dirintaj, ke mi dum mia vivo ne fariĝos iu estiminda — foje pretervenu ĉi tie kaj vidu min tia. La noktsurtuto bone akordiĝis al mia vizaĝo, kaj entute ĉio ĉi treege plaĉis al mi.

Tiel mi do sidis, pripensante tion kaj tion: ke ĉiam la komenco estas malfacila; ke la pli distingita vivo ja efektive estas tre komforta; kaj sekrete mi decidis, ke mi ne plu vojaĝos, ke mi ankaŭ ŝparos monon kiel la aliaj kaj certe ankaŭ iam fariĝos iu granda en la mondo. Sed malgraŭ miaj decidoj, zorgoj kaj aferoj mi dume neniel forgesis la plejplej belan sinjorinon.

La terpomojn kaj aliajn legomojn, kiujn mi tro-

vis en mia malgranda ĝardeneto, mi eljetis kaj enplantis nur plej elektitajn florojn, pro kio la kastela pordisto kun la granda, impona nazo — kiu, de kiam mi loĝis tie ĉi, ofte venis al mi kaj estis fariĝinta mia intima amiko — pripense rigardis min elflanke kaj prenis min kiel homon, kiun subita feliĉo frenezigis. Sed mi ne lasis min kontraŭinflui; ĉar nemalproksime, en la sinjora ĝardeno, mi aŭdis delikatajn voĉojn parolantaj, inter kiuj mi opiniis elkoni tiun de mia bela sinjorino, kvankam pro la densa arbeto mi nenium povis vidi. Mi do ĉiutage kunligis bukedon el la plej belaj floroj, kiujn mi havis, transgrimis ĉiuvespere, kiam malheliĝis, la muron kaj metis ĝin sur ŝtonan tablon, kiu staris tie meze de laŭbo; kaj ĉiuvespere, kiam mi alportis la novan bukedon, la malnova estis for de la tablo.

Iun vesperon la kastelaj gesinjoroj estis forraj-dintaj por ĉasi; la suno ĵus subiris kaj kovris la tutan teron per lumo kaj brileto. La Danubo belege, kvazaŭ vera oro kaj fajro, serpentumis malproksimegen; de sur ĉiuj montoj ĝis profunde en la lando la vinkulturistoj kantis kaj ĝojokriis. Mi sidis kun la pordisto sur la benketo antaŭ mia domo kaj ĝojis en la varmeta aero, kiel la gaja tago malrapide antaŭ ni malheliĝis kaj mallaŭtiĝis.

Jen subite la kornoj de la revenanta ĉasintaro aŭdiĝis elmalproksime, de tempo al tempo la unuj al la aliaj ĉarme respondantaj de la kontraŭaj montoj. Mi estis vere gaja ĝis la fundo de mia koro kaj salte ekstaris kaj kriis kvazaŭ ensorĉite kaj ekstaze: „Ha, kia metio, la nobla ĉasarto!“

Sed la pordisto trankvile elfrapadis la cindron el sia pipo kaj diris: „Nu, tio estas nun via ideo. Mi ankaŭ partoprenis tion; sed oni gajnas apenaŭ la plandojn, kiujn dume oni eluzas. Kaj ankaŭ tuso kaj nazkataro neniam onin forlasas; tio devenas de la eterne malsekaj piedoj!“

Mi ne scias — tiam sensenca kolero kaptis min, tiel ke vere mi tremis tutkorpe. Subite la tuta viraĉo kun sia teda mantelo, la senfinaj piedoj, lia tabakflarado, la granda nazo kaj ĉio ĉi estis al mi abomenindaj. Mi ekprenis lin, kvazaŭ furioze, ĉe la brusto kaj diris: „Pordisto, foriĝu nun hejmen; alie mi tuj ĉi tie bastonos vin!“

Tiuj vortoj revokis al la pordisto lian antaŭan opinion, ke mi frenezigis. Suspekte kaj kun sekreta timo li rigardis min, liberigis sin de mi, nedirante unu vorton, kaj iris, dum ke li ankoraŭ ĉiam mirtimante rerigardis al mi, per longaj paŝoj al la kastelo, kie li eldiris senspire, ke nun mi efektive perdis la prudenton.

Sed mi devis fine laŭte ekridi kaj ĝojis korege, ke la supersaĝa kunulo estis for; ĉar estis ĝuste la horo, kiam laŭ mia kutimo mi metis la bukedon en la laŭbon. Ankaŭ hodiaŭ mi rapide transsaltis la muron kaj ĝuste iris al la ŝtona tableto, kiam mi aŭdis nemalproksimajn ĉevalpaŝojn. Mi jam ne povis forkuri; ĉar mia bela sinjorino mem, en verda ĉasvesto kaj kun balanciĝantaj plumoj sur la ĉapelo, jam venis tra la alĉo malrapide rajdanta kaj, kiel ŝajnis, en profundaj pensoj. Mi sentis same kiel iam, kiam mi legis antaŭe ĉe mia patro en la malnovaj libroj pri „La bela Magelone“.

Sed mi devis fine laŭte ekridi kaj ĝojis korege, ke kornoj sonis pli kaj pli proksime, kaj la vesperlumoj ŝanĝiĝis — mi ne povis min formovi. Sed ŝi forte ektimis, kiam subite ŝi vidis min, kaj haltis preskaŭ senvole.

(Daŭrigota)

LA BOFRATO

Japana legendo · Originale de Petra Kalt · Traduko de Emmy Thiel

(Fino)

La suno atingis la ekliptikon jam antaŭ longe. La ĉerizarboj komencis flori; tiam Kljori insistis ekmarŝadi. La tago estis fiksata; en tiu nokto Kljori apenaŭ dormis. Si havis la senton, ke la ĉambro malvastiĝis kaj ŝajnas premmortigi ŝin; tion ĝis nun ŝi neniam rimarkis. Si enviis la maljunulon, kiu tiel trankvile kuŝis sur tero, kaj dormis tiel pace, sen moviĝo; la lunlumo surglitiris lin.

Si apenaŭ rezistis la deziregon ekstari kaj atendi la tagon, vikle okupante sin per la vojaĝo-preparoj. Si ne faris tion, plenrespekta por la maljunulo. Poste ŝi malvarmiĝis, envolvis sin preme en sian kovraĵon kaj dormis mallonge, malkviete ĝis matene.

Frue ŝi leviĝis. Ofte la maljunulo leviĝis pli frue ol ŝi. Si miris ke li eĉ ne tiam vekigis, kiam ŝi okupis sin mallaŭte. Kiam ŝi opiniis, ke estas tempo, ŝi vekis lin. Li ne malfermis la okulojn; ŝi skuis la brakon, sed la tuta korpo kunmoviĝis; ŝi volis suprenlevi ĝin, sed ĝi estis rigida. Arda ektimo kaptis ŝin, grandega doloro trafluis ŝin. Maljuna bonin estis mortinta. Si estis soleca kiel antaŭe. Si iris al la eta, ke hinin venu, cindrigi la korpon. La cindro plenigis ornamitan kesteton, kiun la maljunulo destinis por tiu celo, kaj ĉiam havis preta.

Neniun horon ŝi volis perdi. Sed kien porti la cindron? Liberigita de propra pakaĵo, ŝi decidis kunporti la plej amatan, kiu restis al ŝi. Post ŝia patro, tiuj restaĵoj estis la plej kara trezoro sur tero. Lia bona spirito, de kiu multe estis plantita en ŝia animo, certe altiros aron da spiritoj. Si troviĝos survoje en la plej bona societo.

Ĉiuloke, kie ŝi petis tion, oni donis al ŝi pli ol sufiĉe por satigi sian malsaton kaj ankaŭ por forigi la soifon. La plimulto de la homoj, kiujn ŝi renkontis, estis malriĉaj, diligentaj kaj modestaj. Malfortaj virinoj faris malfacilan kamplaboron, turnis la akvolevan radon de la tirputo; ili pene portis ŝarĝon. Al ĉiuj ŝi volis helpi, faciligi laboron, sed por tio ŝiaj propraj fortoj ne sufiĉis.

Si renkontis survoje bovĉaron, kies gvidanto estis malbona best-ekspluatulo, kiu sen kompato batis la bovojn. Si rememoris sian fratinton, kies koron ŝi malbone traktis. Si subpremis ĉiun riproĉon kaj preterpasis, klinante la kapon.

Kelkaj vojaĝotagoj kondukis ŝin proksimen al ŝia celo. Nun la strato fariĝis pli larĝa, kaj plena je homoj, kiuj iris en festo-vestaĵoj. Estis la tempo de falantaj ĉerizofloroj. Si certe alproksimiĝis la urbon, pri kiu maljuna bonin parolis. Vere, baldaŭ ŝi estis meze de la urbo. El ĝardenoj videbliĝis la florarboj kun la branĉoj malsupren pendantaj. Ili ĵetis sian ornamaĵon sub la piedojn de la homoj tiel, ke ili paŝis sur ĝi kiel sur

flortapiŝo. Grandioza estis tiu beleco, kiu ĉirkaŭis la pilgrimanton.

Gaja babilado zumis tra la aero; oni trinkis teon en la strato, kaj manĝis la kukojn, kiujn oni alportis. Tiu vigla moviĝo turmentis Kljori'n, la jama timemo revenis al ŝi. Ne kutimigita al tiu amaso da homoj, kaj tiel malriĉe, simple vestita, la kesteton sub la brako, ŝi devis preteriri. Tio ĝenis ne nur ŝin mem, sed ankaŭ la festoĝojantojn, kies rigardoj estis allogataj de ŝia kontrasta aspekto.

Tio dolorigis ŝiajn okulojn, kiam ŝi vidis tiujn „florvestaĵojn“, stel-desegnaĵojn kaj belajn skarpojn. Estis kvazaŭ la rigardoj, turnitaj al ŝi, ekboras ŝin. Genoj surfalis ŝin, konscio pri ŝia kulpo estiĝis. Ĉe ĉiu paŝo ŝi faletis sur malglata kapŝtona pavimo; sur lignaj sandaloj, faritaj de bonin, ŝi pene kaj konvulsie forŝovis sin. Bona bonin kiu akompanas ŝin, muta kaj sen konsolado.

Post longa tempo — sen fino ŝajnis al ŝi — ankaŭ tiu vojodistanco estis malantaŭ ŝi. La plej malfacila parto de la vojo por ŝi, vere! Si enspiris, kontentigita. Preskaŭ ŝi estis kredinta ĉion perdita, kion bonin glatigis en ŝia animo. Malrapide li fondis altajn emojn en ŝi. Nun ŝi trovis sin mem, kaj la premo pasis.

El la monaĥejoj ŝi elektis tiun, kiu situis plej flanke. Si estis bonvenigata, amike kaj helpeme. Kiam ŝi rakontis, kion kaj kiun ŝi alportas, estiĝis unue konsterno. Oni kuris por venigi abaton, Li, kiu neniam vidiĝis eĉ la venantaj gastoj, rapide alvenis. Maljuna bonin ŝajnis esti bone konata ĉi tie; el la konduto de la monaĥoj oni povis konkludi, ke li estis atestimata.

La abato konsideris ŝin feliĉa posedo de la sanktulrestaĵoj. Kljori estis invitata resti sen limigita tempo en la monaĥejo. Si ĝuis respekton rimarkindan, kies kaŭzon ŝi nur pli malfrue eksciis, kiam la

abato venigis ŝin ankoraŭ unu fojon al ŝi.

Kiam oni donis al ŝi modestan, sed ĉarman ĉambron, ŝi petis informon, se estas pilgrimadotempo, ĉu la multaj homoj, kiujn ŝi renkontis survoje al la urbo, ĉiam ankoraŭ supreniros ĉi tien.

„Ne“, oni informis ŝin, „ili ĵus estas malsuprenirintaj.“ Kljori ĝojis ke tempo kaj trankvilo estis donataj al ŝi. Si montris al la dioj la kaŭzon de ŝia deziro je kvieteco, kaj elpetis ilian konsilon kaj protekton. Akre longa estis la vojo, kaj la turmentoj de la koro ankoraŭ pli gravaj. Nun la celo estis atingita.

Ĉe la norito de la pastro ŝi kaŭrigis sin sur la ŝtonplatoj, klinante la kapon, aŭskultante internan voĉon. De bonin ŝi lernis la instruon pri pensigo. Si sentis la spiriton de Bonin. Ne plu forte ŝi estis sentanta ĝin, kiam

Nokta poemo

De Petro Preradoviĉ

Ronedancas helaj steloj
Sur ĉiela blua rondo,
Dancas nur mallaŭte, dolĉe,
Por ne veki nian teron.

Ĉar la tero estas laca
De la manoj laborintaj,
De l' piedoj iradintaj
Kaj de koroj, kiuj batis.

(Esperantigis el la lingvo kroata
K. Koller)

Nachtlied

Sieh im Rundtanz hehre Sterne
an dem blauen Himmelsbogen!
Leise nur und sanft sie tanzen,
um die Erde nicht zu wecken.

Denn so müde ist die Erde
von den arbeitsharten Händen,
von den wanderwehen Füßen
und von Herzen, die da schlugen.

Übertragen von A. Günther

li vivis. Li, kies animo neniam estis ŝargita per malbono, apartenis en la mondo de spiritoj al la plej bonaj, kiuj povis direkti la sorton de homoj al la plej bona celo.

Dum sia restado en la dua parto de la monato ŝi ĝojis, ĉar ŝi aŭdis internan voĉon la unuan fojon ankoraŭ malforte, apenaŭ kompreneble. Ŝi penis forpuŝi la eksteran mondon ĝis klara kompreno. Ŝi aŭdis ke ŝi devos iri hejmen, kaj honeste prezentigi al la vizaĝo de la fratino kaj purkore plian taskon plenumi, kiu atendos ŝin.

Se la fratino, tiel meditis ŝi, ne rezignis pri la intenco mortigi ŝin, kiel povos ŝi gardi la fratino de interna malbono de ŝia agado? Estis jam pardonite al ŝi, antaŭ ol ŝi plenumos tion. Ŝi devos aranĝi tiamaniere, ke ŝi laŭŝajne mortigos sin mem.

Ŝi sciigis la abaton, ke ŝi decidis iri hejmen. Li petis ŝin veni al li. Li esprimis sian dankon por la cindroj de Bonin.

La abato rakontis al ŝi: „Li estis neordinara homo. Iam dum vivo li ĝuis plej grandan respekton. Oni migrados nun tien, kie troviĝas postrestaĵoj de li. Estos la honoro de mia monaĥejo prepari la dignan ejon. Ŝuldatan al li.“ La abato menciis okazaĵon el la vivo de Bonin. Li estis en la servo de Teno: li rajtis vidi la diecon per siaj propraj okuloj, servi la idon de Amaterasu. La Bonin trairis ne publike sed sekrete akran batalon por la kronjuveloj: pro sia deca konduto, kiu ne konis perfidon, li estis venkita de intrigo. Sankta glavo ja restis senmakula kaj la imperiestro gardis sian aŭtoritaton. La juro, kiun la Ujji provis malklarigi, estis brila, klara kiel diamanto. Se la sankta spuglo donis bildon de pureco kiel iam, tiam ni ŝuldas tion al maljuna Bonin. Li malkaŝis konspiron, kaj konvertis la incitantajn pere de kompreno ekkoni racian verecon sen glavobato.

La abato daŭrigis: „Li estis unu el la plej eminentaj, kiuj restis nekonataj. En sia propravola izolado kaj modesta vivo, li vivis kiel la plej malriĉa homo: li estis la paŝanta bushido mem, konata tra la lando kiel helpemulo. Neniu afliktulo estis malakceptata.“

Oni ne volis lasi ŝin foriri sen akompananto. Ŝi rifuzis tion. Tamen ŝi devis toleri, ke oni kondukis ŝin sur la ĝustan vojon kaj ke ŝi estis direktata de rekomendoj.

Do la hejmvizaĝo ne estis tiel longa kaj danĝera kiel ŝia migrado al la dioj, kiam ŝi, konfuzita, ankoraŭ ne sciis pri la renkonto de la dioj ĉiuloke, ne nur en sanktejo. Pliriĝigita kaj plensperta ŝi iris hejmen.

Timante la nekonataĵon, kiu ŝin atendos, ŝi eniris la patran domon. Akceptite de servisto, kiu demandis ŝin pri ŝiaj deziroj kiel fremdulino, ŝi petis vidi sian fratinojn Amaju. Antaŭ ol vidi la aliajn, ŝi devis reguli la aferon kun sia fratino. Kiam Amaju vidis kaj tuj ĉirkaŭbrakis ŝin, Kljori preskaŭ svenis pro anima ekscitiĝo. Cion ŝi atendis, sed ne tion. Poste ŝi vidis la patrinojn. Ankaŭ ĉi tiu karesis ŝin longe, sen vortoj premis ŝin al sia koro. Peza korbatado pasis, kaj neniu povis diri eĉ nur unu vorton, ĝis ili trankviligis.

Kljori demandis pri la patro. Patrino kaj fratino

jetis la manojn antaŭ la vizaĝon. Kljori sciis ke li estas unuigita kun Bonin. La tuta doloro kaj aflikto falis sur ŝin, ŝi ne plu povis forteni ploradon. Tiel ili plorĝemis unuigitaj, travivante kune la unuajn kruelajn minutojn de retrovo.

„Kaj Karaĥina, mia amata fratineto, mia favorulino?“ demandis Kljori.

„Ŝi sekvis la ombron de la patro kaj estiĝis cindrida, amata de dioj kaj bonaj spiritoj“, respondis la patrino plorante.

„Vian edzon“ — ĉi tie Kljori haltis iomete. „mian bofraton mi volas ankoraŭ saluti.“

„Mi volas alkonduki lin“, diris Amaju, „kaj montri al vi mian malgrandan filon!“

La plej granda surprizo estiĝis por Kljori: La bofrato ne estis Taire. Amaju prezentis al ŝi kiel edzon junan, agrablajn homon, kiu nomiĝis Miĥi.

Kljori eksciis ke Taire faris belajn okulojn tiam al Amaju, kiam ŝi, Kljori, malaperis. Sed li rigardis ankaŭ aliajn inojn kaj Amaju eltrovis sufiĉe frue lian malseriozan karakteron antaŭ la edziĝo, bedaŭrinde nur tro malfrue, por eviti la malakordon kun la fratino. Tion ŝi ofte kaj profunde bedaŭris.

Miĥi estis oficisto. La patro destinis al Kljori la vendejon: kiel ŝian edzon li elektis honoran filon de komerca amiko, li mem bedaŭrinde ne havis viran heredulon.

La edzeco de Kljori fariĝis plej feliĉa. Ŝia diligento kaj tiu de ŝia edzo fondis al iliaj infanoj bone starigitan firmaon kun solidaj filioj. Nuntempe en Dai Nippon la firmao kreskis por estiĝi unu el la plej grandaj de la tuta lando: ĝi estas vaste konata ekster ties limoj.

Listo de japanaj vortoj

Amaterasu,	sundiino
aya,	speco de damasto
bonin,	nobelulo
biva,	liuto
bushido,	titolo de libro pri morala leĝo:
Dai Nippon,	Grand-Japanujo
dori, palaco	„Vojo de militisto“
eta,	tombisto, kadavristo
gokoku,	Reis, Gerste, die fünf Hauptfrüchte: Weizen, Hirse, Bohnen, später alle Getreidearten
haikai,	poeziaĵo el malmultaj strofoj aŭ kun certa nombro da silaboj
hinin,	mortint-portisto
itoha,	skribsigno
kami,	felicega spirito
ke,	domo, kabano
kimono,	gesinjora robo
kinu,	silko
kirano,	katuno
miya,	templo de Sinto-religio
kami,	bona spirito
karaĥina,	karulineto
miyakko,	kampanaro, ankaŭ negocisto
nishiki,	brokato
norito,	pastra preĝo
omi,	nobela kasto
sake,	vino el la rizo
tera,	Budhana monaĥejo

Auf dem Büchertisch

Einzel eingehende Bücher usw. werden erwähnt, doppelt eingehende besprochen

Por iu pli bona mondo. Kolekto da dokumentoj dediĉita de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko al la XXII-a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj, okazinta en Romo dum la Sankta Jaro 1950-a. — 32-paĝa kajero el tre bona papero, formato 31,5×23,5 cm. Prezo ne montrita.

Das B. I. G. S., eine technisch-administrative Organisation, veröffentlicht in diesem Heft wertvolle Erklärungen über soziale Politik auf der Grundlage christlicher Ideale von Gerechtigkeit und Brüderlichkeit. Es empfiehlt warm, Esperanto als Mittel zur gegenseitigen Annäherung der Völker anzunehmen und verwendet die Welthilfssprache selbst in seinen Veröffentlichungen.

Das in einer einwandfreien Sprache fast druckfehlerlos gedruckte Heft bringt an erster Stelle ein Porträt des jetzigen Papstes Pius XII. und eine Einführung von Jaime Kardinal Camara, Erzbischof von Rio de Janeiro, berichtet über Aufbau und Ziele des Brasilianischen Geogra-

phischen und Statistischen Instituts, veröffentlicht ein Schreiben an den Papst und dessen Erwiderung, verschiedene Entschlüsse, ein Manifest des brasilianischen Episkopats über soziale Tätigkeit und behandelt schließlich in einem Beitrag die Beziehungen zwischen dem B. I. G. S. und Esperanto. Gleich der erste Satz kennzeichnet sie: Esperanto kaj Statistiko, en Brazilo, estas tradicie kunligitaj.

Das Heft ist kein Lesestoff für Anfänger; es zeigt vielmehr, wie auch schwierige, teils streng juristische Themen durch unsere Sprache klar und verständlich ausgedrückt werden können und wäre für hohe Esperanto-Prüfungen ein guter Stoff. Jfb.

Die EP-Rakete

Wir haben die Rakete auf den Kanarischen Inseln verlassen. Sie hat nun wieder ihren Flug zum europäischen Festland zurück angetreten (man vermutete, daß sie von den Kanarischen Inseln wohl nach Afrika oder nach Amerika fliegen würde, aber man irrte sich eben manchmal) und kam nach Barcelona, wo sie von S-ano Delfi Dalmau eine katalanische Form erhielt und von S-ano Marian Solá, Tarrassa, wieder in die Esperanto-Form gegossen wurde, die dann von S-ano Lucien Laurat, Paris, ins Französische und von S-ano Raymond Schwartz in Esperanto rückübertragen wurde. Von Paris nahm sie ihren Flug nochmals nach Norden, nach Schweden, und zwar zu S-ano Hammerlind in Rävlanda. Wir sind gespannt, von woher die nächste Landungsmeldung kommt.



Foto: Dr. Wolf und Tritschler

Ho, kiel bongustas la freŝa, dolĉa nova vino

Septembro estas la monato de la mirinde klara, hela kaj diafana aero, kiu ĉirkaŭblovetas nin kiel mola silko kaj karesas kiel milda dolĉa vino. Jes, vino! Ankaŭ ĝi apartenas al la donacoj de ĉi tiu monato tiel riĉa je donoj el la regno de la bonfara Naturo.

La tuta ĉarmo de la finiĝanta somero kuŝas sur nia bildo. Ankorau sunbrilo kaj sunvarmo etendiĝas super la pejzaĝo, kaj nia migrulino kun videbla plaĉo ensorbas, gluton post gluto, la dolĉan sukcon de la vitoj, la konservitajn sunradiojn de printempo kaj somero. Kaj tamen oni sentas jam la alproksimiĝantan aŭtunon, oni sentas, ke „tio ĉi baldaŭ sin ŝanĝos“ kaj ke malvarmo venos kaj neĝo kaj frosto. Tiam ni devos rifuĝi al la restinta somero en niaj koroj, kaj ĉe gluto da vino ni ree memoros pri la belaj helaj tagoj someraj.

POR LA PACO

Por la paco kaj konkordo,
Por la beno de l' homar'
De la sudo ĝis la nordo
Servu nia kuna far'.

Nian mondon rekonstrui
Volas ni kun forta kor',
Kaj feliĉan vivon ĝui
En amika kunlabor'.

Donu helpon por ĉi tio
Nia lingvo de l' esper',
Estu unu familio
La homar' de l' tuta ter'.

Karl Vanselow

ENIGMO KAJ ŜERCO

Notu bone!

Serĉu nur vortojn sesliterajn kaj metu iliajn literojn laŭvice en la kestetojn. La du lastaj literoj de ĉiu vorto estas samtempe la du komencliteroj de la posta vorto. (Ekz.: Avia(do)loro ktp.)

Fine, elprenu laŭvice la numeritajn literojn, kaj vi ricevos proverbon.

La vortoj signifas:

Verkisto — skribita rakonto — ano de migranta tribo — bedaŭrinde — afabla kaj kompleza (r) — sensotrompo — ne tro multe — kanto-speco — stilepoko — brulaĵo — deziregi — konkuranto — limlando de Francujo — ĵus okazinta afero — samtempe ludi per kelkaj pilkoj — sendependa — (kemia) purigo — novico — dislotado (r) — radiktrunko — malhieraaŭ — sezono — aristokrata — igi dormema — liut-simila muzikilo — riverego en Francujo — literaturajo — herbosaltulo (r) — fiksnajlo — venenaĵo (r) — enspiri [medicina esprimo (r)] — interkomprenilo. (r) signifas radikon. Kaj nun, bonan sukceson! HT.

	10		43		9	46	96	
6		2	33		16	4	29	
22			41	23		38		
	21		17		8		44	30
14		15		39			31	24
	1		40	28		18		3
37			34		27			13
		20		25		26		7
		45		35		47		42
	11	12	5		32			19

Pri tio vi ridos!

Wovon leben?

Ein Fabrikbesitzer legte ungeheuer überzeugend dar, daß er bei seiner Fabrik schon jahrelang nur immer zusetze. Als man ihn fragte, ob es dann nicht besser für ihn wäre, die Fabrik zu verkaufen, sagte er entsetzt: „Verkaufen? Ja, wovon soll ich denn dann leben?!“

Per kio vivteni sin?

Iu fabrikestro treege konvinke klarigis, ke li ĉe sia fabriko jam de jaroj devas subtencele alpigi. Demandite, ĉu do ne estus pli avantaĝe por li vendi la fabrikon, li diris terurite: „Ĉu vendi? Sed per kio mi poste povos min vivteni?!“

Solve de la globo-enigmo
el n-ro 8

(ESPERANTO) volas esti la lingva ponto inter la tutmondaj popoloj.

Der Einsprachler

im Esperanto-Lehrgang muß **üben**, recht viel üben, damit ihm Wörter und Regeln in Fleisch und Blut übergehen.

Der Fremdsprachler im Esperanto-Lehrgang muß . . . auch üben, damit er über manches, was ihm schon bekannt ist, nicht hinweguscht. Überhaupt muß jeder, der fließend sprechen will, üben. Das ist einfach eine Erfahrungstatsache.

Viel Übungsstoff enthält darum unser Lehrbuch

„Wir lernen Esperanto“.

Benutzen Sie es, wenn Sie es noch nicht kennen sollten, einmal in Ihrem nächsten Lehrgang. Sie werden über seine klaren Regeln und Beispiele genau so erfreut sein wie über seinen reichhaltigen und praktischen Übungsstoff.

Limburger Vereinsdruckerei GmbH. / Limburg/Lahn

Urteile über EP

Günter Schmidt, Veltheim

Samtempe mi deziras esprimi al vi mian plej bonan dankon pro la modela redaktado de EP. La bona intermikso de inform-servo, beletristiko, lingvaj problemoj kaj distrajoj ĉiam denove ĝojigas min. La legado de EP estas por mi vera ĝuo.

Bebel Sörensen, Farum, Danio

Ofte mi estas aŭdinta pri via gazeto, sed nun mi havis eblecon por legi decembran numeron. Ĝia aspekto kaj enhavo tre plaĉas al mi. Volonte mi abonos ĝin, sed mi ne scias la plej facilan manieron por fari tion. Eble vi povos informi min.

Neŭescheinung!

Klemenz Wiczorek

KIEL AUTODIDAKTO AL PEDAGOGIA SCIENCO

Ein für jeden Esperantisten sehr interessantes Buch, das sich mit dem Wert der Sprache Esperanto für wissenschaftliche Studien befaßt und jedem etwas geben kann.

40 Seiten in Esperanto Din A 5
in Kartonumschlag 1,80 DM

Kommissionsverlag
Limburger Vereinsdruckerei GmbH.
Limburg/Lahn

Himno de l' Eŭropa - junularo

Kantu ĝin!

Prezo: 0,20 gf. por ekzemplaro.

Esperanto-Fako de Limburger Vereinsdruckerei
Limburg/Lahn

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg. Herausgeber: Ludwig Goppel, Limburg/Lahn, Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstr. 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich —12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Diezer Straße 17. Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.

Werben Sie Bezieher für die Esperanto-Post!

FÜR DIE KURSE IM HERBST!

Zur Werbung für die in den kommenden Monaten beginnenden Kurse verwenden Sie am besten unsere vier verschiedenen Flugblätter.

Esperanto auf einem Blatt

bis 100 Stück 4 Pf, bis 500 Stück 3,5 Pf, über 500 Stück 3 Pf

Unser Weg: Esperanto!

bis 500 Stück 3 Pf, über 500 Stück 2 Pf

Wir rufen Euch, Jungen und Mädels!

bis 1000 Stück 5 Pf, über 1000 Stück 4 Pf

Gegen Esperanto?

bis 1000 Stück 5 Pf, über 1000 Stück 4 Pf

Als Lehrbuch für die neuen Kurse:

Wir lernen Esperanto

Von Wilhelm und Hans Wingen. 80 Seiten im Format Din A 5 mit Wörterverzeichnis und einem Merkblatt für Kursleiter. Preis 2,- DM

Schlüssel dazu (Auflösung der Übungen und Aufgaben.)
Preis 80 Pf

Zur Weiterbildung und zur Übung:

Esperanto in der Tasche

Ein Sprachführer für alle Gelegenheiten des täglichen Lebens. Preis 1,60 DM

Bei allen Bestellungen bitte 10% für Porto und Verpackung beifügen.

Weitere Bücher zur Aus- und Weiterbildung sind in Vorbereitung.

Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/L.